# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報



## en julio

### Skeĉo kun sufloro

En la 23a de julio, dum kelkaj membroj iris for al Nitro, 6 membroj havis komunan lernadon. Temis pri “skeĉo kun sufloro” enkondukita de s-ino Aihara Misako en la junia Hama-Ronda Vespero. Nome iuj ludas skeĉon, sed la enhavan tekston japane sufloras de malantaŭe sufloristo, kion aŭskultinte la ludantoj devas tuj Esperante paroli.

### En Nitro ni aktivis

La 101an Universalan Kongreson (UK) en Nitro (Slovakio) vizitis 12 membroj kaj familianoj el nia grupo — el 60 japanoj, do granda proporcio! En la vespero de la 23a de julio, la komenca tago estis Movada Foiro, kaj ni pretigis budon kune kun Japana Esperanto-Instituto kaj Vjetnama Esperanto-Asocio. Cetere dum la kongreso, ni ricevis lernolibrojn por nia ekspozicio (aliloke raportita), aŭ donacis ĉ. 30 ekzemplerojn de la lernolibro “Hanako lernas Esperanton” al sviso, s-ino Mirelle Grosjean por uzo en Afriko.



## en aŭgusto

### La 3a Fotoekspozicio + “Nia Unua Lernolibro”

De la 22a ĝis la 24a de aŭgusto, en la teretaĝa ekspoziciejo de nia kutima kunvenloko (Kanagawa Kenmin Sentaa) ni okazigis la 3an Fotoekspozicion pri internaciaj agadoj per Esperanto. Ĉi-jare speciale prezentitaj estas la lernolibroj kolektitaj por “Nia Unua Lernolibro de la lingvo”, pri kio ni alvokis en la aprila numero.




Ĉar ĉiuj tagoj estis semajntagoj, kaj en la unua tago atakis nin tajfuno, ni havis entute nur 152 vizitintojn, krom niaj membroj preparantaj, klarigantaj aŭ gaste vizitintaj.


La ekspoziciaĵo inkluzivis grandajn A1-formatajn fotojn prenitajn ĉe UK ktp, prezenton pri Esperanto, klarigo pri la historio de Esperanto en la mondo/Japanio/Jokohamo, Esperantlingvaj tradukaĵoj de la monda literaturo, kaj 28 lernolibroj el 18 landoj aŭ regionoj, kiel sube menciitaj. Dankon al

Esperanto Jokohama

■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas Esperanto Jokohama: Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nisisiba 4-17-9, Kanazawaku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-236-0017)
■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

samideanoj, kiuj sendis al ni, aŭ almanigis al ni lernolibrojn!


(en la ordo: lando / lingvo)
【Azio】
(Koreio / la korea)
(Ĉinio / la ĉina)
(Tajvano (Ĉinio) / la ĉina)
(Mongolio, la mongola)
(Vjetnamio / la vjetnama)
(Hindio (Barato) / la bengala) → **foto 1**
(Taĝikio / la taĝika)
【Eŭropo】
(Germanio / la germana)
(Ĉuvasa Respubliko en Rusio / la rusa, kaj la ĉubasa) → **foto 2**
(Rumanio / la rumana)
(Kroatio / la kroata)
(Ĉeĥio, la ĉeĥa)
(Slovakio / la slovaka)
【Afriko】
(Konga Demokrata Respubliko / la svahila) → **foto 3**
【Meza kaj Suda Ameriko】
(Meksikio / la hispana)
(Ĉilio / la hispana)
【Oceanio】
(Aŭstralio / la angla) → **foto 4**




1




2




3




4

# en septembro

## Pri someraj spertoj kaj gasto el Bulgario

En la 3a de septembro, de la 1a ĝis la 5a ptm-e en nia kutima kunvenejo ni havis okazon prezenti nian someran sperton Esperante. Ĉi-jare ni havis gaston el Bulgario, s-ro Angel Ivanov Maglov. Entute estis 20 esperantistoj.



Jene estis la programo
1. Suzuki Keiichiro: "Impreso pri la 101a UK en Nitro"
2. Sibayama Zyun'iti: "Pri la komitata kunsido de UEA kaj la sekvo"
3. Sibayama Noriko: "Kun slovaka amikino, 34 jarojn poste"
4. Iwaya Mituru: "Kvar vidindaĵoj de Nitra"
5. Nanba Fumiharu: "Plu nova komputila ludo"
6. Fuse Kentaro: "Vulkano Hakone"
7. Angel Ivanov Maglov: "Pri Bulgario"
8. Akiya Hideo: "Lernante Esperanton ĉirkaŭ unu jaron"
9. Miyazaki Hideko: "'Lerninte pri la problemo en Palestino' en malferma universitato de Japanio"
10. Doi Ĉieko: "Pri Antaŭkongreso kaj Postkongreso"
11. Doi Hirokaz: "Pri la ekspozicio"

## Eseo

# Vojaĝo en Francio en 2015

Aida Kiyoshi

La Universala Kongreso de Esperanto (UK) de 2015 okazis en Lillo, Francio situanta ĉe la landlimo de Belgio dum ok tagoj. Ĉifoje ni kvin esperantistoj vizitis kaj vojaĝis 16 tagojn en Parizo, Lillo kaj Normandio.

Ni restis kvar tagojn en Parizo antaŭ la kongreso. En Parizo s-ino Francine Schwartz bonvenigis nin en la hotelo najbare de la stacidomo St. Lazare. Ŝi gvidis nin en la urbo Parizo. Ŝi estas la filino de la verkisto Raymond Schwartz kaj la romano "Kiel akvo de l' rivero" estas fame konata. Ŝi estas tre afabla virino.

La sekvantan tagon ni kvinope (foto 1) ekskursis al Fontainebleau kaj Barbizon. Ĉe la Chateau de Fontainbleau ni admiris la belan, luksan kaj pompan trezoron de la 12-a ĝis la 18-a jarcento (foto 2). Posttagmeze ni vizitis la muzeon de Barbizon. Kontraste la muzeo estas malgranda kaj simpla. La urbo Barbizon estas malgranda, sed bela kiel turisma loko. Laŭ la strato estis vice ekspoziciataj la mozaikaj bildoj de pentristoj de Barbizon-skolo (Millet, Corot, Rousseau ). (fotoj 3,4)

Ni turismis en Parizo gvidate de s-ino Francine la sekvantan tagon.

Post la fermo de la kongreso ni veturis al Caen, la granda urbo en Normandio per la aŭto de s-ro Yves Nicolas, nia gastiganto. Li estis la publika oficisto pri bonstataj entreprenoj kaj establis la esperantan societon de ĉirkaŭ 40 membroj en la urbo Caen. Lia edzino nomiĝas Anne-Marie kaj estis instruistino de filozofio en supera mezlernejo, Lycee. Ŝi havis profundan konon pri la japana literaturo. Sed ŝi ne komprenas Esperanton, do ni interparolis per la angla lingvo. La domo estas duetaĝa kaj dum nia restado la geedzoj uzis la duan etaĝon kaj ni libere uzis la unuan etaĝon konsistantan de necesejo, duŝejo, lavejo, litĉambro kaj gasto-ĉambro. En la ĝardeno kreskis floroj kaj pomarboj kaj la geedzoj kulturis multe da legomoj. En ĉiu mateno pomo-konfitaĵo, kiun la edzino faris, estis



①



②



③



④

aranĝita.

En tiu vespero ni kvin japanoj estis invititaj al vespermanĝo en la nova apartameto de ges-roj Senekal. Partoprenantoj estis sep francoj kaj unu ruso el Sankto-Peterburgo. La ruso estas poeto kaj verkis la verkaron en Esperanto kaj la franca. Li prelegis pri la verkaro kaj sorto de Pasternak kaj aliaj tiutempaj literaturistoj en Rusio en la seminario de la UK en Lillo.

La sekvantan matenon ni vizitis kun Yves la postsignon de batalejo de Caen, kie tri kvaronoj da domoj forbrulis en la dua mondmilito. Staris tri monumentoj kun girlando laŭ la rivero. Laŭ la klarigo de la monumentoj cent-okdek paraŝutistoj surteriĝis ĉi tie per glitflugiloj sen sonoj kaj venkis la germanan armeon.

Tiun vesperon ni iris al la parko kun lokaj esperantistoj, kie staris la elpendaĵo montranta "Esperanta Placo". Ni estis komune fotitaj en tiu placo. Tio estis publikigita en la loka ĵurnalo sekvmatene. (foto 5)



⑤

Ni vizitis la lernoĉambron kaj bibliotekon de la asocio, kie la fotoj de japanaj vizitintoj estis ekspoziciataj sur la muroj de la ĉambro.

Tiun vesperon ni estis invititaj al la "pot-luck" manĝo-kunveno ĉe la domo de s-ino Brigitte Cottin. La partoprenantoj gaje kantis la rusajn popolkantojn akompanate de gitaro-ludo de la ruso.

En la 3-a de aŭgusto ni havis la ŝancon admiri fame konatan tapiŝon en la muzeo Bayeu. Danke al prizorgo de ges-roj Senecal, prezidanto de Caen-Esperanto-Asocio, ni povis ĝui la raran bildrulaĵon.

La tapiŝo, fakte brodaĵo, estis farita en brita monaĥinejo meze de la 11-a jarcento. Temis pri



⑥

la batalo inter la reĝoj de Normandio kaj Anglujo. Normandio konkeris Anglujon en 1066. Baze de tiu okazaĵo, en la tapiŝo disvolviĝis brilaj scenoj unu post la alia en la stilo de bildrakonto. Ĝi estis 50 centimetrojn larĝa kaj 70 metrojn longa, ne finita aŭ ekzakte dirite ne troveblas la lasta parto ĝis nun. La serio da rakontoj estis interesa kun esprimitaj moroj kaj situacioj. Uzmaniero de koloroj estis eleganta kaj alloga.

Supre kaj sube de la bildoj aperis multaj strangaj bestoj, floroj, similaĵoj al kandelingoj aŭ homoj, ĉiuj en diversformoj, nerilataj al la rakonto kiel ekz. nudaj paroj. Tiuj interesaj bildoj ŝajne devenis de la fabeloj de Ezopo. (foto 6)

Poste ni vizitis la Katedralon de Notre-Dame kaj la muzeon de la Batalo de Normandio. En la muzeo ni spektis la batalon per modeloj kaj bildoj. La batalo daŭris 77 tagojn ĉe la marbordo de Normandio.

En la 4-a de aŭgusto ni vizitis la fiŝistan urbon Honfleur situantan ĉe la buŝo de la rivero Sejno. Tie ni spektis la plej grandan kaj antikvan preĝejon faritan de ligno en Francio.

La lastan vesperon en Normandio ni estis invititaj de s-ino Michele Langeois. La edzo estas neesperantisto kaj verkisto de dokumenta verko kaj havas intereson en japana potplantaĵo.

En la 5-a de aŭgusto ni adiaŭis multajn esperantistojn ĉe la kajo de la stacio Caen. Ni finis la vojaĝon en Francio daŭrantan 16 tagojn.

